



Norvega Esperantisto

ESP ER AN TO B LA D ET

N-ro 7
1966

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
CEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
32-a (37-a) jaro
Monata

Nova, kaj pli vigla, sezono!

Ne estas sekreto ke dum la lastaj jaroj okazis tro malmultaj Esperanto-kursoj en nia lando. La rezulton de tio ĉiu povas facile elkalkuli: aperas nur malmultaj novaj esperantistoj, la malnovaj fideluloj iom post iom malaperas kaj la membronombro ne kreskas, aŭ eĉ malkreskas.

Ĉiujare U.E.A. aranĝas konkurson inter la landaj asocioj, laŭ la kresko (aŭ malkresko) de la membraro, aŭ, pli ĝuste, estas du konkursoj: unu por landoj kun forta movado, kaj unu por landoj kun malforta movado. Norvegujo ĉiam aperis en la unua konkurso, sed dum la nuna jaro ni aperas en la dua, inter la landoj, kies movado estas konsiderata kiel malforta. N.E.L. ne protestis al U.E.A. pri tio. Sed ni protestas al ni mem, kaj per tio ankaŭ al vi, karaj membroj. Estas nia kulpo ke nia movado nun estas konsiderata malforta.

Sed tio devas ne daŭri. Estas nia devo zorgi ke venontjare ni denove aperos en la unua konkurso. Estas nur unu rimedo por atingi tion.

Ni troviĝas nun je la komenciĝo de nova laborsezono. Niaj fortostreĉoj, kaj la rezultatoj, kiujn ni atingos dum tiuj ĉi tagoj, estos decidaj por

la tuta sezono ĝis la venonta somero. Ĉiu el ni povas ion fari. La klubaj estraroj, sed ankaŭ unuopaj membroj, povas starigi kurson, serĉi la kursgvidanton kaj la kursejon, plani la varbkampanjon. Ĉiu povas paroli kun siaj amikoj, kolegoj k.t.p., por varbi ilin kiel kursanojn. Ĉiu povas kolekti kelkajn interesiĝantojn en studrondo kaj mendi por ĝi la korespondan kurson. Multaj el ni povas paroli kun gazetredaktoro, klopodante igi lin akcepti la gazetan kurson por publikigo.

Ĉion tion ni devas fari nun. Post monato la homoj jam estos elektintaj sian libertempan okupon por la sezono. Ni kaptu ilin nun, kiam ili ankoraŭ cerbumas pri tio, kiel plej bone utiligi sian liberan tempon. Ni ja scias ke ili ne povos utiligi ĝin pli bone, ol per studado de Esperanto. Venontan someron ili havos okazon iri al la Kongreso en Israelo, unu el la plej interesaj landoj en la mondo.

Karaj membroj, okaze de la sezonkomenciĝo mi havas al vi nur tiun peton: faru ion! Faru ion nun tuj, por plivastigi la rondon de la uzantoj de la internacia lingvo en nia lando!

C. Støp-Bowitz.

La printempaj ekzamenoj

Elementa ekzameno en junio 1966

DIKTAJO

Logiko

En malgranda skota urbo / ne estis barilo / ĉirkaŭ la tombejo. / Tio ŝajnis / al la nova vicparohestro / esti ne bela, / kaj li decidis fari ion / por ŝanĝi tion. / Li komencis kolekti / monon al *fondaĵo* / por konstrui belan barilon. / Ĉiu donis iom / escepte de *McTavish*. / Poste la vicparohestro / demandis lin, / kial ne ankaŭ li volis / partopreni la starigon / de la nova barilo. /

«Ne,» respondis *Mac*, / «estas tute sence / konstrui barilon ĉirkaŭ tombejo, kaj ankaŭ misuzo de mono. / Tiuj, kiuj estas interne de ĝi, / tamen ne povas eliri, / kaj kiuj estas ekster ĝi, / tute ne volas veni internen.» /

Vicparohestro = kapellano
Fondaĵo = fond (Navnene staves)

TRADUKAJO

Min kone og hennes venninne lånte en dag bilen og kjøre ut i skogen. De parkerte ved et tjern. Der var de helt alene, og det var varmt. Derfor bestemte de seg for å bade (seg) — uten badedrakter.

Mens de *plasket* (1) i vannet, kom to eldre bønder og satte seg ved siden av klærne deres.

Venninnen var ikke redd, og hun svømte til stranda, hvor det lå en gammel *sinkbalje* (2). Denne holdt hun foran seg mens hun gikk mot mennene og ba dem gå vekk. Da de ikke straks gikk, målte hun dem med øynene og sa:

«Vet dere hva jeg tror?»

«Ja,» svarte den ene smilende, «du tror at det er *bunn* (3) i *sinkbalja*.»

1) plaske : plaŭdi, 2) sinkbalje : zink-kuvo, 3) bunn : fundo.

Supera ekzameno en junio 1966

TRADUKAJO

Salgs-geniet

Den nye ekspeditøren hadde bare vært i forretningen i en uke, men på det ukentlige salgsmøtet ble han likevel tildelt en premie for sitt store salg. Salgssjefen kunne ikke helt forstå hvordan den nye ekspeditøren hadde greid dette, og spurte ham om det.

«Jo,» sa den unge mannen, «*kunden* (1) kom inn for å kjøpe noen fiskekroker, og da sa jeg til ham at han kunne trenge et fiske-snøre også. Så solgte jeg en *fiskestang* (2) til ham, og så en *snelle* (3) til å sette på stangen. Men så sa jeg at han kanskje ikke hadde noen båt. Og så solgte jeg en båt. Og til båten solgte jeg en tilhenger. Etter at jeg hadde spurt ham om han hadde bil til å trekke tilhengeren, solgte jeg bilen min til ham.»

Etter en lang pause sa salgssjefen: «Men om jeg ikke husker feil, ble De ansatt i avdelingen for prospektkort?»

«Ja, det er riktig, det,» svarte ekspeditøren. «Det var noe jeg glemte å fortelle. Kunden kom sant å si for å kjøpe et pent prospektkort til kjæresten, som var innlagt på sykehuset for å bli operert for *blindtarmen* (4). Da sa jeg til ham: «Nå har De ikke noe å ta Dem til i de første par ukene. Da kunne De jo like godt dra på fisketur.»»

- 1) kunde : kliento
- 2) fiskestang : fiŝvergo
- 3) snelle : bobeno
- 4) blindtarm : blindtarmsbetennelse = apendicito

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de la redakcio: Hulderveien
17 B, Sarpsborg. — (Limdato por
manuskriptoj: la 20. en la monato
antaŭ la apero.

Abonprezo: En Norvegujo kaj ekster-
lando: n. kr. 8,—

Anonprezoj: $\frac{1}{1}$ paĝo kr. 150,—
 $\frac{1}{2}$ p. kr. 75,—, $\frac{1}{4}$ p. kr. 38,—
 $\frac{1}{8}$ p. kr. 19,—.

Denove: ek!

Nova sezono: utiligu ĉiujn spertojn el kursoj kaj kongresoj! Faru paroladojn, verku artikolojn, aranĝu altkvalitajn klubprogramojn! — Tio ja signifas: interesigu multajn personojn pri Esperanto, kaj retenu la jam interesigitajn, zorgu, ke ili ne foriru pro neinteresaj programoj kaj senvaloraj kunestadoj.

Cetere: legu la frontpaĝan artikolon en ĉi tiu numero de nia gazeto!

70 milionoj

La 6-an de oktobro delegacio de UEA transdonos al la Ĝenerala Sekretario de UN en New York la Proponon pri solvo de la lingva problemo.

La rezulto de la «subskribkampanjo» estas 919 895 individuaj subskriboj — kaj subskriboj de 3 840 organizaĵoj kun entute 70 milionoj da membroj.

Sciigoj de N.E.L.

La aŭtuna laboro. La Liga Estraro insiste admonas ĉiujn klubojn kaj membrojn nun fari eksterordinarajn klopodojn por denove progresigi Esperanton en nia lando. Absolute ĉiu klubo kaj laŭeble multaj rektaj membroj devas nun starigi almenaŭ unu kurson. Se neniu loka esperantisto povas gvidi kurson, kolektu interesigantojn en studrondo, kiu povas lerni per la koresponda kurso; provu igi iun gazeton publikigi nian gazetan kurson. Vidu cetere la pasintan numeron de Norvega Esperantisto.

Taskotabelo por la kluboj. — Oktobro: La kluboj aranĝas kunvenojn por ĉiuj esperantistoj en la loko (ĉiuj, kiuj iam partoprenis kurson), laŭeble oni sendu invitilon al ĉiu unuope. La kunveno estu planita kun la celo (re-)membrigi ilin. Ĉirkaŭ la 24a de Oktobro ĉiuj kluboj aranĝas kunvenon dediĉitan al la tago de U.N. - Antaŭ la 15a la sekretario sendas al N.E.L. (kun kopio al la distrikto) raporton pri la 3a jar-kvarono (blankedo A10). La kasto sendas al N.E.L. (kaj al la distrikto) kotizon kaj liston de novaj membroj kaj de eventualaj malfrue pagintaj malnovaj membroj. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

La 52a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Tel-Aviv, Israelo, somere 1967. — Detaloj sekvos.

Raporto de la Liga Estraro pri la 2a jar-kvarono. Oni okazigis du estrarkunvenojn kaj elsendis al la kluboj unu cirkuleron kaj unu numeron de Kluba Bulteno de

Klubo Esperantista en Oslo kun invito al la jubileo de la sveda Esperanto-movado. Oni preparis prelegvojaĝojn por H. Schiller, Aŝvinikumar kaj Hidejuki Sakaeda. Oni intertraktis kun Norvega Esperanta Fervojojista Asocio pri gazeta kunlaboro. Oni planis kunvenon de la Liga Konsilantaro, sed devis rezigni je la plano pro nesufiĉa aliĝado. — Harda Danielsen, R. Bugge-Paulsen kaj C. Støp-Bowitz reprezentis la Ligon en la ĝenerala kunveno de Eldonejo Esperanto A/S. Oni nomis Kjell Gustavsen reprezentanto de N.E.L. ĉe la Kongreso en Budapeŝto kaj proponis Johan Matland reprezentanto de la norvega registaro. Oni ricevis la finkalkulon de la Nordlanda Esperanto-Kongreso en 1965, kiu montris deficiton de kr. 4485,09. El tiu sumo N.E.L. devas kovri kr. 750,-. Oni atentigis al «Norsk Kulturråd» pri nia laboro. Oni komisiis al Ludv. Anjer prizorgi novaĵojn el Norvegujo al la Esperanto-gazetoj. Oni decidis pli vigle klopodi por varbi norvegajn kongresanojn al la Universalaj Kongresoj.

Tago de Unuiĝintaj Nacioj — jubileo de UNESKO. Ĉiu klubo okazigu memorigan programon okaze de la 20-jara jubileo de UNESKO la 4an de Novembro, dum laŭeble proksima tago, eventuale en kombino kun la memorigo pri la Tago de U.N. la 24an de Oktobro. Materialon oni trovas en la libro «Aktualaj problemoj en la nuntempa internacia vivo». El tiuj kunvenoj oni bonvolu sendi al la ĝenerala sekretario de U.N. (s.ro U Thant, United Nations, New York (NY), Usono) gratulan telegramon aŭ mallongan leteron en Esperanto.

Bonvolu elekti laŭeble plej internaciajn esprimojn, tiel ke ili estu tuj kompreneblaj. Estas tre grave ke la sekretariato de U.N. ricevu centojn da telegramoj kaj leteroj okaze de tiuj datrevenoj, el ĉiuj partoj de la mondo.

La Liga Estraro.

HANS KRISTIANSEN :

La unua tago en la lernejo

Ho, tiuj plankoj nove lakitaj!
Tiuj paŝoj unuaj. Sakrilegio.
Mi klinas l'okulojn kiel morna anĝelo
ĉe l'pura, grandioza vizaĝo de Dio.

Ĉar sidas jen Inger kaj Kari kaj Bjørg.
Kaj ili estas nur bruna konfido.
Kun sunpalaj, sabloflavaj haroj
super brilaj, seriozaj okuloj.
Ĉar ili jam plukis mirtelojn,
kaj ili frapetis la ĉevalon,
kaj ili ludis en mil marondoj,
kaj ili spertis l'unuan amon.
Kaj ili promenis brako en brako
tra kampoj someraj kaj tra la arbaro
kaj supren, supren laŭ la deklivoj.
Tie ili trovis sovaĝajn frambojn.
Ankoraŭ la haroj odoras trifolion.

Kaj ĉi tie staras mi.
En mia jakpoŝo
mi sekrete premeegas
la brilan ponardon de nereakta objekto.

Mi ombrigas al mi per mano
kaj fikse rigardas malantaŭen
al kvar nerevokeblaj, nudaj paŝoj.

Ne rigardu sur min!
Mi estas morna anĝelo.
Miaj okuloj estas tiuj de Kain.
Miaj piedoj estas tiuj de Kain.

Trad: EAH

Informoj de la Ekzamena Komisiono

Ekzamenoj plenumitaj. Dum Majo-Junio 1966 en Oslo superan ekzamenon sukcese plenumis Birgit Normann kaj elementan ekzamenon sukcese plenumis Kjell Berggreen, Gudrun Brodin, Laili Kahrs, Kr. Mortensen.

Ordinaraj aŭtunaj ekzamenoj. Ekzamenoj okazos ĉirkaŭ la 1-a de Decembro 1966. Instruistanoj ekzamenon oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenon en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Sauda, Tromsø kaj Trondheim. Oni anoncu sin sur la presitaj skemoj riceveblaj de la lokaj ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, antaŭ la 1-a de Novembro. Personoj, kiuj faros la ekzamenon ne en Oslo, plenu po 2 — du — skemojn. *Plenu la skemojn precize kaj komplete! Aliĝoj, kiuj alvenos post la 1-a de Novembro, ne estos konsiderataj.*

Jenaj helpiloj por la sinpreparado al ekzamenoj estas aĉeteblaj ĉe la Ekzamena Komisiono, Boks 942, Oslo 1, poŝtĝirokonto 100.34:

Ekzercaj taskaroj: Kajero I: traduktaj taskoj por elementa ekzameno. Kajero II: diktaĵoj por elementa ekzameno. Kajero III: traduktaj taskoj por supera ekzameno kaj taskoj por instruista ekzameno. Prezo por unu kajero: kr. 1,— + afranko.

Vortlisto por Adi: La Forto de l' Vero, kr. 0,50 + afranko.

Ekzamena Regularo kun ekzamenaj programoj kaj konsiloj pri lernolibroj kaj literaturo, kr. 0,50 + afranko.

Notu ke ĉi tiujn helpilojn oni aĉetas ĉe la Ekzamena Komisiono.

Ekzamena Komisiono de NEL.
C. Støp-Bowitz
prezidanto

Evald Danielsen forpasis

Atingis nin la trista mesaĝo, ke ankoraŭ unu el la «malnovaj» Esperantistoj mortis.

Evald Danielsen fariĝis Esperantisto en 1925 kaj tiel povus jam lastjare celebri sian 40-jaran jubileon kiel membro de «Ascendo». Li estas kavaliro de la kluba ordeno «La verda ŝlosilo». De 1965 li estis estrarano kaj pres-representanto, kiun oficon li plenumis akurate kaj konscience. — Evald Danielsen havis la membrojn de «Ascendo» ĉe si en sia hejmo nur 14 tagojn antaŭ sia mortotago, la 27a de majo, kaj nun li ne plu vivas! Li estis joviala kaj amikema viro kaj bona Esperantisto.

Ni forte sentos lian foreston.
Li ripoza en paco!

H. Fr.

Mortis Majken Wagle Jørgensen

Nia kara samideano Majken Wagle Jørgensen mortis la 26an de junio.

Ŝi estis membro de nia klubo — La Esperantoklubo de Bergen — de 1945.

Ŝi estis tre aktiva esperantisto. Du periodojn ŝi estis prezidanto, multajn jarojn membro de la estraro, instruistino en la «Libera Instruejo» kaj estis en multaj jaroj, ĝis la morto, delegito. Ŝia korespondado sin etendis super la tuta mondo. Ŝi estis piano-instruisto, kaj ŝi ĉiam estis preta ĝojigi nin per ludo dum niaj kunvenoj.

Ŝi partoprenis 18 mondkongresojn, kaj ankaŭ sin anoncis al nunjara en Budapeŝto, sed la morto venis tro frue. Ŝi entombiĝis la 30an de junio.

Inter la multaj florkronoj estis unu de la Esp.klubo de Bergen, kiun Jenny Jahren kun memorvortoj metis sur la ĉerkon.

En nia klubo ni neniam forgesos nian karan Majken. Ŝia lumo ĉiam brilos en nia memoro.

Por samgeklubanoj: *Johs. Jahren*

PIONIRO JUBILEAS Ragnvald Rian 75-jara

La 14. de septembro Ragnvald Rian, Trondheim, unu el la ĉefaj pioniroj de la Esperantomovado en Norvegujo, estis 75-jara. Rian ĉi-jare ankaŭ povas festi 60-jaran jubileon kiel esperantisto, ĉar li esperantistiĝis en 1906 dum sia tago de konfirmacio, kiam li ricevis la lernolibron de Skeel-Gjølring kiel donacon.

Rian estis estrarano de NEL de 1911 — preskaŭ sen interrompo — kaj en 1913 li estis ĝia sekretario. Tuj antaŭ la ĉeso de Norvega Esperantisto en 1914 li fariĝis ĝia kunredaktoro. En 1913—41 li estis delegito de UEA, kaj en 1935—57 li estis ĉefdelegito por Norvegujo.

Rian naskiĝis en Skogns Markabygd apud Levanger, sed de 1911 li loĝas en Trondheim, kie li tuj elektiĝis prezidanto de Grupo Esperantista, kaj dum malfacilaj, same kiel en favoraj tagoj, li gvidis la klubon kaj la Esperantomovadon en Trondheim per firma mano.

En 1923 Rian verkis — kaj poste gvidis — korespondan kurson en Esperanto por bontemplanoj. La kurso havis 10 instruletojn. Sed plej bone li estas konata pro siaj bonegaj vortaroj: Norsk-Esperanto ordbok (Trondheim 1932), Esperanto-Norsk ordbok (Oslo 1949) kaj Norsk-Esperanto ordbok (Oslo 1963). La lastan li verkis en kunlaboro de Erling Anker Haugen.

De 1948 Rian estas Honora Membro de UEA. Li estas la sola norvego, kiu atingis tiun distingon! Honora Membro li ankaŭ estas de NEL (de 1949) kaj de Grupo Esperantista (de 1952). En 1951 NEL honorigis lin per la ordeno PRO MERITO, Komandoro de la 1a klaso, kaj en 1964 la Ordena Kolegio decidis doni al li la plej altan gradon, kiun norvega esperantisto povas ricevi, nome la Grandan Krucon.

Ni tutkore dankas al nia pioniro kaj sendas al li la plej varmajn bondezirojn kaj gratulojn!

LKH

Geburg Aasland 80-jara

Orgenisto Geburg Aasland estis 80-jara la 13an de aŭgusto. Li naskiĝis en Kragerø kaj esperantistiĝis jam en 1904. En tiu jaro granda intereso por Esperanto vekigis inter la blinduloj pro la apero de la brajla lernolibro «Lærebog i Esperanto» de Th. Cart/Zamenhof, trad en la danan lingvon de Julius Wulff. La lernolibro rapide disvastiĝis inter la blinduloj en la nordaj landoj. Estis tiam nur malmultaj libroj akireblaj en brajla skribo, kaj pro tio preskaŭ ĉiuj blinduloj legis ĉion kio eldoniĝis en punkta skribo. Aliĝis do al la Esperantomovado pluraj norvegaj blinduloj, kiuj poste fariĝis pioniroj ne nur en la Esperantomovado, sed ankaŭ en la porblindula laboro — personoj kiel Aasland, Alf Arnesen, Erik Harildstad, Edvard Imsdahl, Laurits Lie, Oscar Skaug k. a.

Aasland estas konata kiel bonega deklamisto sub propra pianakompano, kaj esperantistoj el multaj landoj povis ĝui lian potencon deklamon de la pastra parolado el Peer Gynt dum la UK en Oslo 1952. Dum ĉi tiu UK li ankaŭ estis orgenisto dum la Protestanta Diservo kaj cetere faris prelegon pri norvega muziko.

Ni sendas al la jubileulo niajn plej korajn gratulojn!

LKH

75-jara

Poŝta prokuristo *Laurits Oddenes*, de multaj jaroj fidela membro de «Mara Vento» en Haugesund, ĵus iĝis 75-jara. Ni sendas al li postfeste niajn plej korajn salutojn kaj bondezirojn.

O. T.

O. T. Nicolaisen 60-jara

La konata kursgvidanto O. T. Nicolaisen, Stokholmo, estis 60-jara la 13. de aŭgusto. Li naskiĝis en Loppa en Finnmark kaj interesiĝis pri Esperanto en 1929 pere de kurso en «Arbeidermagasinet», ellaborita de Johan K. Eilertsen. Aŭtune 1930 li partoprenis komencan kaj daŭrigan kursojn, kiujn gvidis la estono Neeme Ruus en Kiruna.

Jam en 1932 Nicolaisen mem komencis sian vastan kursgvidadon, kaj ĝis la dua mondmilito li entute gvidis 70 kursojn en Norvegujo por 1500 partoprenantoj, kaj fondiĝis entute 28 kluboj aŭ infangrupoj en 21 lokoj post liaj kursoj. Antaŭ la kursoj li ĉiam faris paroladojn kaj provlecionojn, kaj proks. 1000 tiajn li faris antaŭ 8000 aŭskultantoj!

Krome Nicolaisen ankaŭ gvidis kursojn en Ĉeĥoslovakujo, Danujo, Svisujo, Svedujo, Anglujo, Nederlando, Francujo kaj Germanujo en la periodo 1938—1951. Vere meritoplena agado!

Somere 1936 li partoprenis en la seminario por Cseh-instruistoj en Arnheim, kaj en 1937—38 Nicolaisen estis estrarano de NEL. En 1946 UEA elektis lin Konstanta Kongresa Sekretario (KKS), kaj li funkciis dum la jenaj UK: Bern 1947, Malmø 1948, Bournemouth 1949, Paris 1950 kaj München 1951 (nur ĝis majoj).

Pro lia granda laboro por Esperanto NEL en 1951 honorigis lin per *Pro Merito*, Kavaliro de la 2a klaso. Sinceraĵn dankon kaj bondezirojn!

LKH

Leonjo 60-jara

Kutime ne decas malkaŝi la aĝon de sinjorino, sed kiam temas pri Leonora Sivertsen ŝi meritas atenton je tiu mejlo-ŝtono kvankam estas neeble kredi ke ŝi la 9an de sept. atingas tiun aĝon. Jam antaŭ pli ol 20 jaroj ŝi

fariĝis aktiva membro de la Esperantoklubo de Bergen. En la jaro 1947 ŝi elektiĝis kasistino, kaj poste ŝi fidele okupis ĉiun honoran oficon en la klubo. — Jam de la starto de Okcidenta Distrikto de NEL ŝi aktive laboris, kaj pasintjare ŝi funkciis kiel ĝia prezidanto. — Kiel fakdelegito kaj vizitanto de mondkongresoj kaj gastiganto por alvenantaj gesamideanoj ŝi povas kalkuli grandan aron da geamikoj kiuj kun ĝojo rememoras agrablan kuneston.

Ni ĉiuj elkore dankas pro via ĝisnuna laboro por Esperanto kaj deziras al vi daŭran sanon kaj forton. O.

Kelkaj rimarkigoj pri la participa demando

En Norvega Esperantisto n.ro 2/1965 H.Fr. recenzas la 4an volumon de la Fabeloj de H. C. Andersen en la traduko de Zamenhof. Mi bedaŭras ke mi ne pli frue havis okazon reagi al kelkaj malpravaj konkludoj en tiu recenzo. Temas pri la finaj konkludoj, kie li klopodas pruvi la zamenhofecon de la aspekta senco de la pasivaj participoj *-ata* kaj *-ita*.

Kiel ĉiuj aspektuloj H.Fr. volas kredigi al la legantoj ke Zamenhof regule uzadis *-ata* por esprimi daŭron aŭ ripeton, *-ita* por esprimi finitecon aŭ rezulton, kaj li citas kelkajn ekzemplojn, kiuj ŝajne subtenas tiun kredon. Estas vero ke li citas ankaŭ unu ekzemplon, kie Zamenhof per *-is -ata* klare esprimas senaspektan samtempecon, sed li nek substrekas la puran tempecon de tiu ekzemplo, nek mencias ke oni trovas multajn tiajn ekzemplojn en la verkoj de Zamenhof.

En mia studo pri la temo, publikigita en la verko «Esperanto - moderna lingvo», favore recenzita en Norvega Esperantisto de Otto Prytz, mi citas ankaŭ jenajn ekzemplojn el la recenzita verko: «Nur en apartaj lokoj ili estas interrompataj de argilecaj deklivoj...» (samtempeco; verbo de

«rezulto sen daŭro», kiu laŭ la aspektuloj ne povas ricevi la estantajn participojn); «Tamen en la ĉiela regno neniu animo povos plu diri: «li neniam estis amita!»» (antaŭtempeco; verbo de «daŭro sen rezulto», kiu laŭ la aspekta teorio ne povas ricevi la estantajn participojn). En la verkaro de Zamenhof troviĝas multaj similaj ekzemploj.

Poste aperis ampleksa studo «La Esperanta Konjugacio» de Teo Jung. Li zorge kontrolis ĉiujn verboformojn en 6 Zamenhofaj verkoj (Fabeloj I—IV, La Revizoro, Marta) kaj konstatis 194 *-is -inta-*formojn, kiuj senescepte estas *antaŭtempaj* (t. e. pluskvamperfektoj) kaj 938 *-is -ita-*formojn, el kiuj 897 estas *antaŭtempaj*, dum ne pli ol 41 estas klarigeblaj nur el vidpunktoj pli-malpli aspektaj. Sekve nur 4 % el la Zamenhofaj *-is -ita-*formoj subtenas la aspektan teorion. Certe granda parto de la 897 estas akordigeblaj kun ambaŭ teorioj, kaj bedaŭrinde ne estas kalkulitaj la formoj neakordigeblaj kun la aspekta teorio, kiuj sekve subtenas rekte nur la tempan, kiel la supre cititaj ekzemploj; sed mi apenaŭ troigas se mi supozas ke ankaŭ tiuj formas minimume 4 %.

Se ni do supozas ke 92 % de la Zamenhofaj *-is -ita-*formoj estas akordigeblaj kun ambaŭ teorioj, 4 % nur kun la aspekta kaj 4 % nur kun la tempa, estas granda blago kaj blufi se oni volas pravigi nur la aspektan teorion per la lingvouzo de Zamenhof. Kiel mi montris en «Esperanto — moderna lingvo», la tempa sistemo estas minimume same laŭfundamenta kaj same Zamenhofa, kiel la aspekta. Plie, la difinoj de Zamenhof pri la verbaj formoj ne lasas dubon pri tio, ke ili estas nete tempaj. Por esprimi la daŭran aŭ ripetatan aspekton Zamenhof donis la sufikson *-ad*. La rifuĝo de la aspektuloj al adverboj kiel *jam*,

antaŭe, por esprimi pluskvamperfekton, estas ankaŭ nura provo pri lerta elturniĝo. Montriĝas ke Zamenhof preskaŭ neniam utiligis tiun rimedon.

La aspektuloj ĉiam klopodas kredigi ke la tempa sistemo estas aparta ĝermana ideo. Nakamura en sia recenzo pri mia studo skribas: «oni pledas por la kompleta ĝermanigo de la Esperanto-verbosistemo.» Ankaŭ tio estas nura blufi. En mia studo mi montris ke ankaŭ lingvoj el aliaj branĉoj (ekz. la litova) kaj el aliaj lingvofamilioj (ekz. la finna) havas pure tempajn konjugaciojn. Lastatempe Aŝvinikumar' informis ke la hindia lingvo eĉ havas precize la samajn 6 participajn formojn, kiujn posedas Esperanto, kaj ke ili estas uzataj tute kiel la Esperantaj laŭ la tempa sistemo.

Kiel mi montris en «Esperanto — moderna lingvo», la tempa sistemo estas tiu, kiu plej bone harmonias kun la tuta strukturo de Esperanto. Estas konata fakto ke ĝuste la aspekt-havaj verboformoj estas la nevenkebla malfacilaĵo por alilingvanoj lernantaj la rusan lingvon. Kredeble tio grave kontribuis al la fiasko de de la rusa en norvegaj gimnazioj. Sperto plie montras ke ekz. nederlandaj, norvegaj kaj aliaj lernantoj ne povas kompreni kial la franca lingvo havas du preteritajn formojn, kaj neniam sukcesas uzi ilin senerare. Sendube tio estas almenaŭ parto de la kaŭzo kial la franca agonias en niaj gimnazioj.

Estas tute evidente ke se la aspekta sistemo estu la sola ĝusta en Esperanto, estus komplete sensece kaj senespere daŭrigi klopodojn por enkonduko de Esperanto kiel la facila internacia lingvo en granda grupo da landoj.

C. Støp-Bowitz.

RECENZOJ

Aparte taŭga por studrondo

Veterano? Aŭtoro: Ismael Gomes Braga. Eld.: Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Rio de Janeiro.

Ĉi tiu libro aperis unuan fojon en 1937, okaze de la ora jubileo de Esp.o. Ĝi konsistas el respondoj al aktualaj demandoj, kaj el originalaj artikoloj. Nia samideano Ismael Gomes Braga estas vera veterano, kvankam li mem ne ŝatas tiun esprimon, li opinias ke veterano estas iu kiu jam ekŝiĝis el la movado! (Tial la demandsigno post la titolo!)

Legante ĉi tiun bonege skribitan verkon, oni devas senti grandan admiron por la aŭtoro, kiu dediĉis tiom da jaroj por Esperanto. Legante ĝin, oni ekhavas veran bildon pri la tuta esperanta movado. Kvankam la aŭtoro loĝas en Brazilo, montriĝas ke liaj problemoj kaj spertoj tre similas al tiuj de eŭropa samideano.

La diversaj ĉapitroj estas ege interesaj, kaj la kono de Ismael Gomes Braga pri diversaj temoj estas impona. Kun granda intereso mi ekz. legis pri la komparo inter Esperanto kaj la hebrea lingvo.

La libro estas historio de nia movado, ne nur en Brazilo, sed en la tuta mondo. Sed ĝi estas multe pli. Ĝi donas al ni temojn por pripensi kaj analizi, instigon kaj inspiron por nia plua laboro por Esperanto.

Mi dezirus ke ĉiu vera samideano permesos al si la ĝuon studi ĉi tiun libron, kaj mi estas certa ke ĝi taŭgos tre bone kiel komuna legaĵo por progresantoj en studrondo! La prezo ne estas indikita, sed mi estas certa ke vi kapablas aĉeti ĝin, la amikoj de Ismael Gomes Braga subtenis la nunan eldonon kiu estas pligrandigita.

Elna Matland.

Bohuslän — suna somerparadizo

Nia fervora samideano Einar Dahl, Uddevalla, sveda parlamentano, post multe da laboro sukcesis igi Göteborgs och Bohus Läns Turisttrafikförbund eldoni tre belan faldprospekton pri parto de la okcidenta marbordo de Svedujo. La prospekto estas vere havinda, kaj por prui al la eldonintoj, ke iliaj 5000 kronoj ne estas forĵetitaj, bonvolu peti ĝin ĉe la supre menciita turisma asocio, adreso: Drottningtorget, Göteborg.

Mallonge

Esperanto en praktikon!

Jus aperis multkolora teknika prospekto ekipita per multaj fotografajoj. Tiu ĉi prospekto temas pri ceramika maŝinaro, sanitara ceramikaĵo, ceramikaj produktaĵoj kaj elektro-porcelano fabrikataj en Ĉeĥoslovakio. — Interesuloj el la tuta mondo povas ricevi ĝin kontraŭ rekompenco libervola. Bonvolu skribi al la jena adreso:

ZK Esperanto
Prerovské strojírny
Prerov — Ĉeĥoslovakio

*

«La Skolta Mondo», oficiala organo de la Skolta Esperantista Ligo deziras publikigi skoltajn kantojn. Skribu al la ĉefredaktoro Hans Amund Rosbach, Follidal.

*

Internaciaj Aŭtunaj FERIAJ Kursoj okazos en Århus 16.-23. oktobro en la altlernejo «Junaj hejmoj». Elementan kurson gvidos laŭ naturmetodo s.ro Sjøgård-Hansen, konversacian kurson f.ino Riisberg, perfektigan studrondon s.ro Moravec, kaj preparan kurson por naturmetodaj geinstruistoj s.ro Sjøgård-Hansen.

Skribu al s.ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Åbyhøi, Danujo.

LA BUDAPEŝTA KONGRESO

Budapeŝto, «la Reĝino de Danubo», invitis al U.K. 1966 dum la semajno 30/7—6/8. Ĝi estis la 51a en la longa vico, kaj kun la pli ol 4000 partoprenintoj el pli ol 30 landoj la dua plej granda. Per aviadilo vojaĝis tiuj, kiuj ne havis tempon ĝui la vojaĝon mem, per vagonaro, ŝipo aŭ propra aŭto- aŭ aŭtobuskaravanoj venis la plimulto. Kelkaj saĝuloj elektis ŝipveturadon sur la Danubo, kaj ili supozeble havis la plej ĉarman vojaĝon.

Ek de la unua momento oni sentis, ke la kongreso estas granda evento, bone konata en la ĉefurbo. En ĉiuj haloj de la ĉefstacidomoj ni vidis multajn esperantoflagojn, kaj super ĉiuj ĉefstratoj en la centro flirtis nia standardo. Multaj magazenelmontrejoj havis afiŝon kun esperantoteksto simile al la jena: Esperanto estas ponto de kompreniĝo inter la popoloj aŭ Esperanto kreas pacon en la mondo. Ankaŭ ekzistis Esperantoĉokolado kaj esperantocigaretoj. Kelkaj elmontrejoj eĉ havis etan ekspozicion kun esperantolibroj, ĵurnaloj ktp.

La kongresejo estis en la Domo de la Sindikato de la Konstrulaboristoj, situanta en unu el la plej belaj stratoj de la urbo. Antaŭ la domo estas grandega placo, kie okazas ĉiuj paradoj dum naciaj festotagoj. Meze sur tiu placo estas giganta kvarangula monumentofundamento, kies flankoj estas riĉe ornamitaj per elĉizitaj figuroj, kaj kies supro estas tute malplena, la moderna monumento pri la homa vanteco. Tie staris iam Stalin, kiam li ankoraŭ estis en la modo; post la detronigo li fariĝis pli ol nenio, sed ĝuste la malplena malpleno por eterne memorigas pri li. En pli modesta loko sur la placo staras Lenin en modesta grandeco, en profunda meditado eternigita. Malantaŭ tiu placo etendiĝas la vasta

tereno de la Urba Parko. En tiu parko kuŝas la konstruaĵo, Petöfi-Pavilono, granda foira halo kun neintima atmosfero, sed kun sufiĉe da loko por miloj da personoj. Tie okazis tial ĉiuj grandaj, komunaj aranĝoj: Interkonatiga Vespero, Inaŭguro, Oficiala Balo, Hungara Vespero kaj la Fermo de la kongreso.

La inaŭguro sekvis la tradicion kun nacilingvaj oficialaj salutoj kun traduko. Parolis unue la Alta Protektanto de la Kongreso, Vicprezidanto de la Hungara Popolrespubliko Ödön Kisházi kaj due la ĉefurbestro de Buda-pesto, d.ro István Sarlós. La saluto de tiu lasta estis laŭdinde mallonga kaj konciza. Ok registaroj salutis la kongreson, de la norvega salutis Johan Matland. Unu reprezentanto ne povis deteni sin de la politikumado. Tuj poste levis sin la prezidanto, profesoro Lapenna, kaj per bone elektitaj vortoj li atentigis la parolinton kaj la parolontojn, ke ne estas permesate fari politikan paroladon, ĉar Esperanto estas kaj devas resti neŭtrala rilate al politiko, raso kaj religio. Tiujn vortojn sekvis forta aplaŭdo. — Kjell Gustavsen salutis de N.E.L.

Ĉe la tablo, kune kun la estraro de U.E.A., sidis la du honoraj kongresanoj, Julio Baghy kaj Kálmán Kalocsay. Kiam la unue menciita salutis la kongreson, regis plena silento en la granda halo. Kun emocio ni aŭdis lian voĉon, kiun dum la lastaj jaroj malfortigas la sufokigaj astmoatakoj. Denove ni povis konstati, ke inter esperantistoj ricevas nia kara Paĉjo novajn fortojn. Per minutlonga aplaŭdo dankis la esperantistaro. — La festparoladon faris profesoro d.ro Ivo Lapenna.

Inter la multaj valoraj programeroj de la kongreso la Arta Festivalo meritis apartan laŭdon, ĉar ĝi havis ĉi-

tiun jaron eksterordinare altkvalitajn prezentadojn. La Pola Ŝtata Teatro de Lodz prezentis la dramon en du aktoj, Katakli-Malamiko, de Shimon Winckelberg. La du aktoroj ludis bone, kaj la enhavo estas interesa. Du soldatoj, malamikoj, estas la solaj homoj sur insulo. Ili ne povas kompreni la lingvon unu de la alia, kaj oni vidas la multajn klopodojn akiri homan kontakton trans la lingvaj baroj.

La Internacia Arta Teatro donis la prezentadojn en Teatro Madách. Ili prezentis «La unua paŝo» de Francisko Molnár, «La morto de la ekscelenco», dramo en unu akto de Marijan Matkoviĉ, ambaŭ tradukoj el respektive la hungara kaj la serbo-kroata. Ambaŭ prezentadoj estis ĉiurilate bonegaj. Kial la tria tamen rikoltis la plej fortan aplaŭdon — verŝajne ĉar ĝi estas teatraĵo verkita en Esperanto de Julio Baghy, kun muziko de alia populara esp.o M. Sárosi. «La holanda pupo» apartenas al la fruaj teatraĵoj de Julio Baghy. Ĝi estas vodevilo, en kiu abundas komikaj scenoj, tipaj por la stilo de Baghy. Kune kun la ĉarma muziko, ludita de la orkestro de Budapeŝtaj Pedagogoj la prezentado estis vere unika.

La Bulgara Esperanta Teatro ankaŭ havis tre altnivelajn prezentadojn, dum kiuj estis prezentataj verkoj de kvar diversaj verkistoj. Eble estus pli bone, se la programo estus estinta iomete pli mallonga, ĉar al la prezentado apartenis ankaŭ modernaj estradaj kantoj, kaj bulgaraj, naciaj kantoj. Eĉ la plej delikata manĝaĵo en tro abunda kvanto tro satigas.

En pli modestaj salonoj mi ĉeestis du valorajn prezentadojn:

1. Roland Depuis ludis fortepianon, kaj prezentis konatajn verkojn de Frédéric Chopin. Samtempe li, per lumbildoj, montris scenojn el la vivo de la komponisto.

2. La pupteatra prezentado. Sep aktoroj kun «gant-pupoj» eminente ludis «La sorĉa fajrilo» de H. C. Andersen. Anna Bánd meritis laŭdon pro sia reĝisoro laboro, kiu gvidis al senduba sukceso, kaj al la espero revidi tian teatron dum venontaj kongresoj. Al la sukceso kontribuas Vera Bódy, kiu kreis la tipojn, kiuj vere donis vivon al la pupoj. Kaj de tio grandparte dependas la sukceso de pupteatro. Grava parto estas ankaŭ la muziko, kiun faris István Láng. Ĝi bone sekvis la scenojn kaj estis grava kontribuo al la ĉarmo de tiu prezentado.

La lastan vesperon ricevis la kongresanoj fortajn impresojn pri hungara folkloro. Dum horoj ni ĝuis la karakterizajn dancojn el diversaj regionoj de la lando. Gejunuloj en belegaj, kolorriĉaj kostumoj, en fajraj dancritmoj, akompanitaj de eminenta orkestro ankaŭ en kolorriĉaj kostumoj, kaptis nian atenton dum horoj. Ŝajnis ke la publiko ne povis satiĝi, ĉar pli kaj pli forta estis la aplaŭdo. La kulmino de la prezentado estis, laŭ mia opinio, «La dua hungara rap-sodio» de Fr. Liszt. Neniam mi aŭdis ĝin tiamaniere ludita!! Nepriskribebla travivaĵo!! — Al la programo apartenis ankaŭ kantoj, hungaraj kaj ciganaj kantoj estis kantataj parte en Esperanto.

Estis kompreneble multaj aliaj bonaj kaj valoraj programeroj, sed mi ja ne povis ĉeesti ĉie, mi elektis laŭ mia propra gusto. Tial mi kapablas raporti nenion pri la «serioza parto» de la kongreso, pri ĝeneralaj kunvenoj. prelegoj ktp, Sed pri ili ekzistas oficialaj raportoj.

La dekan fojon okazis la Infana Kongreseto, kun sufiĉe bona partopreno. Oni ankaŭ aranĝis interesan ekspozicion, kiu donis informojn pri la lando kaj urbo en kiu ni gastis.

(daŭr. p. 72)

LA VIZITO DE IBSEN EN BUDAPEST

Du datrevenoj atentigas nin pri la verkisto — ofte nomata la norvega giganto, *Ibsen*, nun estas sesdek jaroj, ke li mortis kaj antaŭ sepdekkvin jaroj li vizitis Budapeŝton, la nun-jaran kongresurbon.

Por mi jam en mia juneco Ibsen havis grandan altirforton. Depost 1899 oni ludas liajn teatraĵojn en Budapeŝto. Unuafoje en 1899 la «Reaperintojn». Tiutempe oni prezentis ĝin germane, kaj ĝi ne havis la merititan sukceson. La gazetkritiko atentis ĝin, sed al la publiko ne plaĉis. Certe estis ia tro nova per ĝia aŭdaca voĉo kompare al la ĝistiamaj modaj, facilaj kaj supraĵaj dramoj de la eŭropa burĝaro. Sed poste gravaj estetikistoj kaj kritikistoj en revuoj kaj ĵurnaloj alvokis la atenton al lia verkaro, kaj kiam en la sama jaro la hungara Nacia Teatro prezentis la verkon *Nora*, parto de la publiko jam akceptis ĝin favore. Nur poste fariĝis la atmosfero pli taŭga por la Ibsen-dramoj.

Kiam en 1891 Ibsen estis en Vieno pro tiea prezentado de unu el liaj verkoj, li akceptis inviton al la hungara ĉefurbo, kio kaŭzis en literaturaj rondoj grandan ĝojon. Oni ja memoris, ke en 1849, kiam flagris la hungara liberecmilito kaj post heroa luktado kruele finiĝis pro supereco de la cara kaj la habsburga armeoj, Ibsen skribis entuziasman kaj laŭdan poemon pri tiu batalo de malgranda popolo kaj priploris la falon de la sankta afero.

Li alvenis al Budapeŝto la 19an de aprilo 1891, kaj la hungaraj akompanantoj rimarkis, ke li bonege parolas germane, sed ŝatas spici siajn frazojn per francaj esprimoj.

Je lia honoro la Nacia Teatro prezentis la saman vesperon *Nora*. Ibsen

rigardis ĝin el la loĝio de la direktoro. Tie li akceptis la entuziasman festan omaĝon de la publiko, sed poste li devis aperi sur la scenejo kaj — kio tiutempe estas malofta okazo — eĉ post malsuprenlaso de la teatra ferkurteno.

Li estis tre kontenta pri la prezentado kaj precipe pri unuaranga ludo de fama hungara aktorino. Li vizitis dum la sekvantaj vesperoj prezentadon en la *Opero*, dramon en la *Nacia Teatro*, kaj pro lia speciala peto oni prezentis muzikan popolteatraĵon.

Dumtage li vizitis la vidindaĵojn de Budapeŝto — multe malpli, ol en la nuna tempo. En la Nacia Muzeo lin precipe interesis la memoraĵoj pri la menciita liberecmilito. Li ankaŭ vizitis kolonion de pentristoj kaj skulptistoj, kaj ĉe la Petöfi monumento li ekstaris kun deprenita ĉapelo, kun pia sento. Li amikiĝis kun la konata aŭtoro Jókai kaj partoprenis bankedojn. Ĉe la dua en la Redutpalaco — kie en 1929 okazis la Universala Kongreso! Ĉeestis centsepdek verkistoj, artistoj, geaktoroj. Estas menciindaj la multaj diverslingvaj tostoĵoj, salutparoladoj: hungare, germane, latine, norvege kaj eĉ — volapüke! Ja Esperanto ankoraŭ ne ekzistis.

Jen kelkaj frazoj el lia dankrespondo: «Jam estis antaŭ longa tempo — ĝi estas jam kvazaŭ sonĝo — kiam mian unuan poemon iu gazeto publikigis. Tiu poemo apostrofis la hungaran nacion. Nin atingis la famo pri la batalo de popolo luktante por ĝia libereco kaj ni ekamis tiun fremdan popolon. Kaj nun, kiam mi estas sur hungara tero, mi pensas, ke mi vidas denove sonĝon. Tiu entuziasmo, tiu amikeco, kiun mi spertas, estas kvazaŭ kara juniganta sonĝo! Multan dankon pro la afabla akcepto!»

Sed tiuj ne estis nur vortoj de ĝentileco. Ibsen estis vere kortuŝita. Georgo Brandes, la fama dana estetikisto post jaroj okaze en prelego en Budapeŝto rakontis, kiel ofte parolis al li Ibsen pri la belaj tagoj en Budapeŝto. Ni esperas, ke similajn memorojn hejmenportos la vizitantoj de la nun-jara kongreso!

Al mi plej multe plaĉis en miaj junaj jaroj — kaj ankaŭ nun — la prezentado de Peer Gynt. Vere entuziasmigis min tiu juvelo de la mondliteraturo — kompareble kun *Faust* kaj la *Tragedio de l' Homo*. Avide mi legis ĝian tiutempan belan tradukon hungare. Oni ripete montris ĝin kun aliaj Ibsenverkoj. Sed tiu restis la plej populara kaj en la lastaj jaroj la Nacia Teatro ludis ĝin tre sukcese laŭ nova poezia traduko de fama hungara poeto Lajos Aprily. La sukcesa poeta interpreto estas trezoro ankaŭ de la hungara poezio! Mi povis ĝui la prezentadon en la televido! Kaj kiom mi ĝojis, kiam mi povis ĝin pro bonvola donaco legi ĝin en la majstra traduko en Esperanto. Pri Ibsen kaj pri Peer Gynt — laŭleginte partojn — en du budapeŝtaj grupoj mi prelegis. Tio estis mia omaĝo al la granda verkisto kaj al la norvega popolo.

El liaj deklaroj en Budapeŝto mi citas ankoraŭ la interesan verkistan konfeson:

«Mi pensas ĉiam en drama formo. Al ĉiu atentita kaj travivita okazintaĵo mia pensado tuj donas dramatan formon. Mi skribas pli facile teatraĵon, ol studon aŭ eĉ leteron.»

Kaj el liaj adiaŭaj vortoj en Budapeŝto, kiuj sonas ankaŭ nun al ni ĉiuj:

«Ni estu solidaraĵoj, ni ja estas realistoj kaj ni deziras resti realistoj. Sed tamen ĉiu iru sian propran vojon tiel, kiel tiu konformas al sia personeco. Ni kontenu en la evoluo, en la progreso...»

Paŭlo Balkányi, Budapeŝto

UNESCO-novaĵoj

Veturantaj instrumaŝinoj

Sukces-kvocianton de 90 % atingis 500 studentoj, kiuj finis kursojn en transportebla permaŝina lernejo, kiu vizitis 12 lokojn en Britujo. La komparebla kvocianto de kursoj per normalaj instrumentadoj estas nur 50 %. La veturilo, ekipita per brite fabrikataj instrumaŝinoj de 16 diversaj specoj, vizitis teknikajn, komercajn kaj plenaĝulajn lernejojn. La ekipaĵo inkluzivis instrumaŝinojn por individuoj kaj por grupoj, por lingvoinstruo kaj por legado.

Por ŝafoj kaj kaproj: kaktosenoj

En Galileo en la lastaj jaroj oni sukcesis kulturi diversajn kaktospecojn sen dornoj, por nutrado de ŝafoj kaj kaproj. La kaktos, kiuj enhavas multege da vitaminoj, tute ne bezonas akvumadon. La rezultoj de tiu eksperimento estis tre kontentigaj, kaj oni nun jam planas planti la kaktos sur grandaj areoj da neplugebla tero.

Internacia Teatro en Londono

Elstaraj teatraĵoj el 5 landoj partoprenis la trian Sezonon de Monda Teatro en la teatro Aldwych de 21. marto ĝis 22. majo. Prezentiĝis tie la Ĉeĥa Nacia Teatro, La Trupo de Junuloj el Italujo, la Greka Nacia Teatro, la Pola Populara Teatro el Varsovio kaj la Teatro Gorkij el Leningrad.

Laŭ Unesco-Features kaj UEA-Informservo

Korespondu!

Miccio Candida, Home St. Anna, Via Varenna, Locarno 6, 600, Ticino, Svisujo, 19-jara fraŭlino, deziras kor.

Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

Klubo Esperantista de Oslo.

5/5. Malfermante la kunvenon, la prez. John Berggreen deziris koran bonvenon al la ĉeestantoj, precipe la invititajn fervojistajn esperantistojn, inter ili la hodiaŭa prelegonto Per Johan Krogstie el Løten kaj lia 6-jara filo Einar, kiu perfekte parolas esperanton.

C. Støp-Bowitz donis ĝojigan informon: Rolf Bugge-Paulsen donacis bildon de D-ro Zamenhof por pendigo en la oficejo de NEL.

Kirsten Ek, kiu administras la Turisman Servon, donis informojn pri la planoj rilate al la Kongresvojaĝo.

La ĉefpunkto de la programo estis lumbildprelego de P. J. Krogstie, kiu montris kaj komentaris multajn trege belajn kolorlumbildojn de la Fervojista Kongreso en Hamar 1965, ankaŭ bildojn de Elverum dum la inaŭguro de la Esperantostrato tie, de la ekskurso al Lillehammer ktp., ankaŭ kelkajn bildojn de Trondheim kaj la vojaĝo tien. — P. J. Krogstie poste legis du tre humorplenajn historietojn en Hedemarkdialekto.

Inter la programpunktoj ni komune kantis «Majkonto»n kaj «Bienetula Polko»n («Husmannspolka» de Alf Prøysen), akompanis per piano Marit Delor. La Kluba Kantgrupo tre bele kaj amuze kantis «Bonvenon ĉarma bela maj».

16/5. John Berggreen redaktis la kluban gazeton «La Vagabondo». Li donis eltiraĵojn de la historio de nia klubo, spritaĵojn kaj revon pri la estonteco de Esperanto. La enhavo estis tre riĉa, interesa kaj humurplena. — C. Støp-Bowitz prizorgis la «10-minutan lingvan instruadon». Li klarigis pri la multe diskutita problemo rilate

al la participoj. — Otto Prytz raportis pri programo en la angla radio koncerne la taŭgecon de Esperanto internacie. — Rolf Bugge-Paulsen menciis novan lingvon «Simula», ellaboritan de 2 norvegoj, verŝajne por uzo en datomaŝinoj.

Ekskurso al Oxval, Nesodden 6/6.

La prez. John Berggreen bonvenigis la ĉeestantojn kaj precipe niajn eksterlandajn gastojn s.inon Antonia de Criach el Hispanujo kaj Zeljko Takaĉ kaj lian edzinon el Jugoslavujo. Li dankis al Eva kaj Carl Støp-Bowitz ĉar ili ankaŭ ĉitium jaron bonkore invitis nin por pasigi la lastan klubkunvenon antaŭ la somerferioj en tiel agrabla loko.

La prez. de la Ekzamena Komisiono C. Støp-Bowitz disdonis ekzamenajn diplomojn. Ŝajnas estis tradicio, li diris, ke oni faras ekzamenojn printempe, kaj la sama afero okazis ĉitium jaron. Li substrekis ke la Esperantoekzameno havas utilon ne nur laŭnome, sed ankaŭ praktike. Li admonis la membrojn ekstudi tiel ke ili venontjare estu inter tiuj kiuj ricevos diplomojn.

Jenaj plenumis ekzamenojn: Superan: Birgit Normann. Elementan: Kjell Berggreen, Gudrun Brodin, Laili Kahrs kaj Kristian Mortensen.

Nia jugoslava gasto kaj amiko Zeljko Takaĉ rakontis pri sia laboro por fari Norvegujon konata en sia hejmlando, kaj li konstatis ke estas tre granda intereso por Norvegujo en Jugoslavujo. Li konsideris sin kiel «norvegiston» kaj li havas ĉ. 600 norvegajn librojn en sia posedo. Li tre ĝojis esti inter malnovaj amikoj.

Otto Prytz legis la tre amuzan historieton de Asbjørn Dybwad «Nordlandsk Kraftkost» (Nordnorvega forta manĝaĵo). — Inter la programeroj oni komune kantis «Esperanton lernas ni»

kaj «Alouette», laŭ akordionakompano de C. Støp-Bowitz.

Post la kafopaŭzo kelkaj klubanoj kolektiĝis sur la ludejo kaj sub gvidado de Brynhild Østmo, asistita de Støp-Bowitz per akordiono, ni ludis kaj dancis ĝis estis necese revojaĝi al Oslo post tre agrabla kunesto en brila vetero.

Ascendo, Halden.

Kunveno ĉe Evald Danielsen.

La prez. legis envenintajn leterojn kaj cirkulerojn. Referis leteron de Townson, Bradford, kiu informas, ke li venos al Halden la 25an de julio kune kun edzino kaj kvin lernantinoj, post kurs-partopreno en Elsinoro. Ili venos per t.n. «minibuso» kaj estos ĉe ni dum tri tagoj.

Post la manĝado kaj kaf-trinkado, kiam Danielsen regalis per pan-tranĉoj kaj bongustaj kukoj, ni transiris al la instrua punkto de la programo, kiu ĉi-foje estis filmprezentado fare de Dahl. Li montris al ni tri filmojn. — Poste Danielsen kaj Fridén ludis duetojn por du violonoj el la ekzercaro de Lange. Ni ankaŭ aŭskultis al la esp.o.-elsendo de Budapeŝt je 20.30.

Grupo Esperantista de Trondheim

10/5 vizitis nin lektoro Hans Kristiansen por legi poemojn el sia kolekto «Liljer i blekkhus» — «Lilioj en inkujo». Li legis kvar poemojn, kiuj humure-lirike priskribas situaciojn en la lernejo. Tuj post ĉiu poemo, legita de li en norvega lingvo, Nils Utne legis esperantan tradukon. La tradukoj estis faritaj de Erling Anker Haugen kaj Lars Kåre Hunnes. (Unu el la tradukoj troviĝas en ĉi tiu numero de nia gazeto. Red.)

Antaŭ la deklamado Utne liveris enkondukon per ekstrakto el artikolo de William Auld en la Zamenhofa jubilea libro pri Esperanto kiel bel-literatura tradukilo.

24/5 Lars Kåre Hunnes legis sian tradukon de la norena kanto «Trymskvida». Tiu traduko, «La Trimkanto», aperis en la lasta printempa numero de «Norda Prismo». Unue li iom klarigis la principojn de aliteracio uzita en tia poezio, kaj antaŭ ĉiu strofo li norveglingve resumis la enhavon de la strofo legota.

Dum tiu lasta ordinara kunveno en la printempo oni decidis aranĝi la kunvenojn ankaŭ dum la aŭtuno en la hejmoj de grupanoj, por ŝpari monon por kurso de Esperanto. Tia kurso estas vere bezonata por ke ni ne tro maljuniĝu, kresko estas necesa.

Kristiansands Esperantoklubb

kunvenis 24/3. Birger Reinertsen parolis pri tropikaj bestoj. — Jakob Lønne voĉlegis la manskribitan gazeton «Nova Stelo». Post tio ni ricevis manĝon. Tiam sinjorino Hauge enkondukis patosan psikologian interbabiladon, kaj ni analizis kaj katojn kaj direktorojn. Nun ni estis venintaj en sufiĉe altan ĉielaeron. Kaj post tempdaŭro sur la altaj pintoj, ni mal-supren-grimpis de la alta montpinto de sinjorino Hauge, kaj rekte havenis en la molkukvalon de Sig. Sørensen. Tie ni haltis kelkajn minutojn, kaj Sigurd donis al ni priskribojn de multaj delikataj kukoj. Poste ni ricevis pianomuzikon de Birger.

Jarkunveno de Meza Distrikto de NEL okazis la 24an de majo 1966 en la hejmo de s-ro Hunnes.

De la estraro ĉeestis la prez., s.ro Lars Kåre Hunnes, kaj la kasisto, s.ro Kristian Fleischer. De GET ĉeestis 12 membroj, do entute 14 personoj. — Bedaŭrinde neniu el Skorovas Esperantoklubo trovis okazon ĉeesti la jarkunvenon.

La prez. malfermis la kunvenon. La raporto por 1964/66 estis voĉlegita kaj aprobata sen rimarkoj, same ankaŭ

la kasraporto. Poste s.ro Nordstrand faris jenan proponon:

«For å nytte ut den kapital som kretsen har, kan den eller de av Kretsens klubber som arrangerer kurs i løpet av perioden 1966/68, gjøre regning med etter søknad å få økonomisk støtte.»

La propono de Nordstrand unuani-me aprobiĝis.

Tiam ni pritraktis kaj diskutis kelkajn rimarkojn, kiujn NEL faris koncerne niajn novajn statutojn. — Poste sekvis la elektoj, kiuj donis jenan rezulton:

Prez.: L. K. Hunnes, Tr.heim (reel.)

Sekr.: Nils Utne, Tr.heim (nova)

Kas.: Kr. Fleischer, Tr.heim (reel.)

Anoj: s.ino Synnøve Kloumann,

Skorovatn (reel.), f.ino Lif Berg,

Tr.heim (reel.)

Rev.: E. A. Haugen, Tr.heim (nova).

Post la jarkunveno sekvis ordinara klubkunveno de GET.

LA BUDAPEŬTA KONGRESO

(daŭr. de p. 67)

Vendredon la 5an okazis inaŭguro de Esperanto-Parko kun senvualigo de memorŝtono. La parko estas bele situanta sur la Buda-flanko de la Danubo, tre proksime al la plej nova ponto, la Elisabeta ponto.

Post la kongresoj oni ĉiam demandas sin mem: kio estas la valoro de la kongreso por la unuopa esperantisto? Miaflanke estas ĉiam la respondo la sama: La persona kontakto kun homoj el la plej diversaj landoj, precipe el landoj kies naciajn lingvojn mi ne komprenas. Tial estis la kongresoj en Varsovio, Sofio kaj Budapeŝto por mi la plej interesaj, sed mi ne hezitas diri ankaŭ la plej lacigaj. Kiam la

nombro de partoprenantoj superas tri mil, la organizado fariĝas malfacila. Eĉ la plej oferema laboro de la lokaj esperantistoj ne povas malhelpi, ke multaj malŝparas tempon per atendo kaj serĉado en la tumulto de la kongresejo. Tial oni devas esti forta, sana kaj tre celkonscia por ne kolapsi. Sed tiuj, kiuj postvivas tiujn gigantkongresojn, ricevis fortajn impresojn pri senkomparebla gastemo kaj helpemo. La nunjara kongreso ne estas escepto. Ni renkontis multajn amikojn, kiuj ne facile povas vojaĝi kien ili deziras, tial estas tre valoraj ĝuste la kongresoj, kiuj povas, pro la elektita loko mem, kolekti la plej grandan nombron, eĉ se iomete suferas la komforto de la unuopa persono kelkfoje. Menciinda sed ebla proza detalo estas la praktika aranĝo, ke ni dum la kongressemajno senpage vojaĝis per ĉiuj urbaj trafikiloj per helpo de legitimilo.

Kirsten Ek

Norsk Esperanto-Forbund (Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

Esperantoforlaget A/S (Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:

Johan Hammond Rosbach,

Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — Uzu tiun

adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.

Telefono: 54 72 7

la kasraporto. Poste s.ro Nordstrand faris jenan proponon:

«For å nytte ut den kapital som kretsen har, kan den eller de av Kretsens klubber som arrangerer kurs i løpet av perioden 1966/68, gjøre regning med etter søknad å få økonomisk støtte.»

La propono de Nordstrand unuani-me aprobiĝis.

Tiam ni pritraktis kaj diskutis kelkajn rimarkojn, kiujn NEL faris koncerne niajn novajn statutojn. — Poste sekvis la elektoj, kiuj donis jenan rezulton:

Prez.: L. K. Hunnes, Tr.heim (reel.)
Skr.: Nils Utne, Tr.heim (nova)
Kas.: Kr. Fleischer, Tr.heim (reel.)
Anoj: s.ino Synnøve Kloumann,
Skorovatn (reel.), f.ino Lif Berg,
Tr.heim (reel.)

Rev.: E. A. Haugen, Tr.heim (nova).
Post la jarkunveno sekvis ordinara klubkunveno de GET.

LA BUDAPEŝTA KONGRESO (daŭr. de p. 67)

Vendredon la 5an okazis inaŭguro de Esperanto-Parko kun senvualigo de memorŝtono. La parko estas bele situanta sur la Buda-flanko de la Danubo, tre proksime al la plej nova ponto, la Elisabeta ponto.

Post la kongresoj oni ĉiam demandas sin mem: kio estas la valoro de la kongreso por la unuopa esperantisto? Miaflanke estas ĉiam la respondo la sama: La persona kontakto kun homoj el la plej diversaj landoj, precipe el landoj kies naciajn lingvojn mi ne komprenas. Tial estis la kongresoj en Varsovio, Sofio kaj Budapeŝto por mi la plej interesaj, sed mi ne hezitas diri ankaŭ la plej lacigaj. Kiam la

nombro de partoprenantoj superas tri mil, la organizado fariĝas malfacila. Eĉ la plej oferema laboro de la lokaj esperantistoj ne povas malhelpi, ke multaj malŝparas tempon per atendo kaj serĉado en la tumulto de la kongresejo. Tial oni devas esti forta, sana kaj tre celkonscia por ne kolapsi. Sed tiuj, kiuj postvivas tiujn gigantkongresojn, ricevis fortajn impresojn pri senkomparebla gastemo kaj helpemo. La nunjara kongreso ne estas escepto. Ni renkontis multajn amikojn, kiuj ne facile povas vojaĝi kien ili deziras, tial estas tre valoraj ĝuste la kongresoj, kiuj povas, pro la elektita loko mem, kolekti la plej grandan nombron, eĉ se iomete suferas la komforto de la unuopa persono kelkfoje. Menciinda sed ebla proza detalo estas la praktika aranĝo, ke ni dum la kongressemajno senpage vojaĝis per ĉiuj urbaj trafikiloj per helpo de legitimilo.

Kirsten Ek

Norsk Esperanto-Forbund (Norvega Esperantista Ligo)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

Esperantoforlaget A/S (Eldonejo Esperanto A/S)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — Uzu tiun
adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.
Telefona: 54 7 27



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 7
1966

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
32-a (37-a) jaro
Monata

Nova, kaj pli vigla, sezono!

Ne estas sekreto ke dum la lastaj jaroj okazis tro malmultaj Esperantokursoj en nia lando. La rezulton de tio ĉiu povas facile elkalkuli: aperas nur malmultaj novaj esperantistoj, la malnovaj fideluloj iom post iom malaperas kaj la membronombro ne kreskas, aŭ eĉ malkreskas.

Ĉiujare U.E.A. aranĝas konkurson inter la landaj asocioj, laŭ la kresko (aŭ malkresko) de la membraro, aŭ, pli ĝuste, estas du konkursoj: unu por landoj kun forta movado, kaj unu por landoj kun malforta movado. Norvegujo ĉiam aperis en la unua konkurso, sed dum la nuna jaro ni aperas en la dua, inter la landoj, kies movado estas konsiderata kiel malforta. N.E.L. ne protestis al U.E.A. pri tio. Sed ni protestas al ni mem, kaj per tio ankaŭ al vi, karaj membroj. Estas nia kulpo ke nia movado nun estas konsiderata malforta.

Sed tio devas ne daŭri. Estas nia devo zorgi ke venontjare ni denove aperos en la unua konkurso. Estas nur unu rimedo por atingi tion.

Ni troviĝas nun je la komenciĝo de nova laborsezono. Niaj fortostreĉoj, kaj la rezultatoj, kiujn ni atingos dum tiuj ĉi tagoj, estos decidaj por

la tuta sezono ĝis la venonta somero. Ĉiu el ni povas ion fari. La klubaj estraroj, sed ankaŭ unuopaj membroj, povas starigi kurson, serĉi la kursgvidanton kaj la kursejon, plani la varbkampanjon. Ĉiu povas paroli kun siaj amikoj, kolegoj k.t.p., por varbi ilin kiel kursanojn. Ĉiu povas kolekti kelkajn interesiĝantojn en studrondo kaj mendi por ĝi la korespondan kurson. Multaj el ni povas paroli kun gazetredaktoro, klopodante igi lin akcepti la gazetan kurson por publikigo.

Ĉion tion ni devas fari nun. Post monato la homoj jam estos elektintaj sian libertempan okupon por la sezono. Ni kaptu ilin nun, kiam ili ankoraŭ cerbumas pri tio, kiel plej bone utiligi sian liberan tempon. Ni ja scias ke ili ne povos utiligi ĝin pli bone, ol per studado de Esperanto. Venontan someron ili havos okazon iri al la Kongreso en Israelo, unu el la plej interesaj landoj en la mondo.

Karaj membroj, okaze de la sezonkomenciĝo mi havas al vi nur tiun peton: faru ion! Faru ion nun tuj, por plivastigi la rondon de la uzantoj de la internacia lingvo en nia lando!

C. Støp-Bowitz.